

Saluton !

He aquí un nuevo número del Boletín Electrónico de la [Federación Española de Esperanto](#).



Jen nova numero de la Bitbulteno de [Hispana Esperanto-Federacio](#).

## LA COMUNIDAD ESPERANTISTA CELEBRÓ EL DÍA DEL LIBRO EN ESPERANTO

El 15 de diciembre se celebró en todo el mundo el **Día del Esperanto**, el idioma internacional que pretender unir a personas de diferentes lenguas, países y culturas, utilizando un medio de comunicación común, justo y equitativo, vivo y con una importante cultura propia.

En más de 100 países del mundo, en más de mil ciudades se organizaron actos muy diversos, que han reunido a los hablantes y partidarios de esta lengua en un espíritu de alegría y colaboración, para mostrar a la sociedad que el esperanto sigue siendo hoy en día un medio de comunicación para difuminar las fronteras y unir a las personas.

En España se han llevado a cabo


## LA ESPERANTO-KOMUNUMO CELEBRIS LA ZAMENHOF-TAGON

La 15-an de decembro, kiel ĉiuj jaroj, la esperantistoj en la tuta mondo celebris la **"Tagon de Esperanto"**, origine "Tago de la Libro en Esperanto" kaj alinome "Zamenhof-Tago". La lokaj grupoj kaj esperantistoj profitis tiun datrevenon por renkontiĝi kaj celebri la Tagon per diversaj agadoj, foje per komunaj bankedoj, foje per kulturaj aktivadoj, prelegoj, ekspozicioj, festoj, ktp.

Pluraj urboj plifruigis la celebradon al la 12-a de decembro, kaj en kelkaj, ekzemple en Zaragozo kaj Sevilo, oni celebris eĉ dufoje.

reuniones de esperantistas y actividades de difusión en localidades como Madrid, Barcelona, Zaragoza, Bilbao, Sevilla (ver foto), Alicante o Santander, pero lógicamente, las celebraciones no se han limitado a la península ibérica. En todo el mundo ha sido posible acercarse a la cultura en esperanto, como forma de reflejar la vitalidad de una lengua aún muy desconocida por el gran público, y sobre la que aún existen demasiados prejuicios.

[Leer más.](#)



En Zaragoza, la grupo "[Frateco](#)" invitis ĉiujn geamikojn partopreni fratan tagmanĝon en restoracio dum la sabato. Poste, la 15-an de decembro, okazis en la sidejo de "Frateco" renkontiĝo kaj celebrado de la Libro-Tago, kun prelego de Antonio Marco Botella kaj gustumado de kelkaj manĝetoj kaj trinkaĵoj dum amikeca babilado.

En Sevilo, la sabaton 12-an oni organizis turisman viziton al la katedralo, kaj poste [komuna tagmanĝo](#) en restoracio. La marton 15-an de decembro, fratan vespermanĝon de la andaluzaj samideanoj (vidu foton sube).

En Barcelono, Kataluna Esperanto-Asocio organizis [tre altiran kulturalan eventon](#). La 15-an de decembro, oni dediĉis la solenaĵon al la memoro de la figuro de la kataluna folkloristo kaj esperantisto [Joan Amades i Gelats](#), kadre de la eventoj de la *jaro Amades*. La evento taŭgis kiel prezento de la unua eksponilo el la serio "Niaj pioniroj", komisiita de Kataluna Esperanto Asocio kaj dediĉita, ĉikaze, al Joan Amades.

En Madrido la Tagon oni celebris la sabaton 12-an de decembro en la "Centro Sociocultural Mariano Muñoz" (ankaŭ konata kiel sidejo de la "[Asociación Vecinal La Cornisa](#)"), en strato Cristo de Lepanto, 11, kvartalo Pradolongo, Usera, per tuttaga programo.

En Bilbao, kiel kutime la

esperantistoj kunvenis en la sidejo, por babili kaj kunmanĝi en la loko mem, la sabaton, la 12-an. La esperantistoj de Santandero kunvenis por frata manĝo en restoracio de la urbo, dimanĉe la 13-an.

La geesperantistoj de Alikanto kaj Murcio kunvenas ĉiujare por celebri la tagon de Zamenhof, en komuna loko. En tiu ĉi jaro ili kunvenis en Alicante, kaj poste ili tagmanĝis en argentina restoracio.

Dum la 15a kaj 16a de decembro, en Malago okazis Ekspozicio pri Esperanto-Libro sub la titolo "Kaj de libro venis Lingvo", vizitebla matene kaj vespere en la Altlernejo pri Lingvoj.

Ankaŭ aliaj urboj celebris la tagon dum tiuj tagoj, aŭ (kiel ekzemple en Valencio) jam post la jarfinaj festoj.



**"LUCES DE BOHEMIA"  
TRADUCIDO AL ESPERANTO**

**TRADUKITA AL  
ESPERANTO "BOHEMIAJ**

Durante la celebración del Día del Esperanto en Madrid se presentó una verdadera joya literaria: la traducción al esperanto de "Luces de Bohemia", la obra teatral de Ramón María del Valle-Inclán, el máximo exponente del género literario conocido como *esperpento*. El traductor ha sido nuestro incansable autor y poeta Miguel Fernández, y la edición ha corrido a cargo del [Liceo de Esperanto de Madrid](#), con la ayuda técnica y el apoyo moral del [servicio de venta de libros de SAT-en-Hispanio](#). Se trata del número 11 de la serie "Hispana literaturo"

El día 21 se organizó una fiesta en la sede de la Federación Española de Esperanto, donde Miguel declamó y explicó algunos fragmentos de la obra.

Los esperantistas y grupos que deseen solicitar ejemplares, pueden escribir al Liceo, a la dirección [madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es).

## LUMOJ"

Dum la celebrado de la Tago de Esperanto en Madrido estis prezentita vera literatura juvelo: la traduko al Esperanto de "Bohemiaj Lumoj", teatraĵo de la verkisto Ramón María del Valle-Inclán, ĉefa ekzemplo de la ĝenro nomata *esperpento*, de li disvolvita komence de la 20-a jarcento. La tradukisto estis nia senlaca aŭtoro kaj poeto Miguel Fernández, kaj pri la eldono zorgis [Madrida Esperanto-Liceo](#), kun teknika helpo kaj morala apogo de la [Libroservo de SATeH](#). Temas pri la 11-a libro de la serio "Hispana literaturo"

La 21-an estis organizita festo en la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio, kie Miguel deklamis kaj klarigis iujn pecojn de la teatraĵo.

La esperantistoj kaj grupoj dezirantaj peti ekzemplerojn, bv. kontakti la Licenon, ĉe la adreso [madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es).



## LA RADIO SE HACE ECO DEL DÍA DEL ESPERANTO

Por el Día del Esperanto, la Federación emitió un [comunicado de prensa](#) que trajo como consecuencia la invitación a varias entrevistas en tres emisoras de radio:

En Radio Vitoria fue entrevistado Natxo Apaolaza (primeros 9 minutos de [este enlace](#))

En Radio Aragón, se emitió una corta entrevista a Lorenzo Noguero en el programa "Despierta Aragón (del minuto 47:56 hasta 51:40 de [este enlace](#)).

En Radio Nacional se han preparado tres programas, tras una entrevista al presidente del HEF: en las noticias de fin de semana de RNE, en el programa "[Cultura con ñ](#)", de Radio Exterior de España, y en "Memoria de Delfín" (aún por emitir), en los programas nocturnos de Radio 1.

## RADIO EĤAS LA TAGON DE ESPERANTO

Por la Tago de Esperanto, HEF lanĉis [gazetarkomunikon](#), sekve al kio ni estis invititaj al tri radiaj intervjuo:

En Radio Vitoria estis intervjuita Natxo Apaolaza (unuaj naŭ minutoj de [tiu ĉi ligilo](#))

En Radio Aragón, aperis mallonga intervjuo al Lorenzo Noguero, en programo "Despierta Aragón" (de la minuto 47:56 ĝis 51:40 de [tiu ĉi ligilo](#))

En Radio Nacional oni pretigis eĉ tri programerojn, sekve al intervjuo kun la prezidanto de HEF: en la novaĵoj de la semajnfino en RNE, en programo "[Cultura con ñ](#)", de Radio Exterior de España (la poreksterlanda stacio de la ŝtata radio), kaj en "Memoria de Delfín" (ankoraŭ elsendota), nokta programo de Radio 1.

## COLABORA CON NUESTRO BOLETÍN

La Federación espera los reportajes de los grupos y de los socios individuales, así como de cualquier esperantista o simpatizante, sobre el Día del Esperanto o sobre cualquier otra actividad que se haya llevado a cabo. Escribe, envíanos tus notas y tus fotos para publicar en nuestro "[Boletín](#)", a [bulteno@esperanto.es](mailto:bulteno@esperanto.es).

Aún hay tiempo, porque el próximo

## KUNLABORU KUN NIA "BOLETÍN"

Hispana E-Federacio atendas la raportojn de la grupoj kaj individuaj membroj, kaj ankaŭ de ajna esperantisto aŭ simpatianto, pri la Tago de la Libro aŭ pri iu ajn alia disvolviĝinta aktivaĵo. Skribu al ni, sendu viajn notojn kaj fotojn, por publikigo en nia "[Boletín](#)", al

Boletín va a demorarse ligeramente, hasta enero, por una razón algo especial: en este número se incluirá la convocatoria a la próxima Asamblea General Ordinaria, que por razones legales debe celebrarse en el primer cuatrimestre, y donde se aprobarán las cuentas, los presupuestos, el informe de actividades y las previsiones para 2016. Además, recordamos que este año debe renovarse la Junta Directiva, y es importante que los socios comiencen a organizar las candidaturas, ante el anuncio de varios miembros de la actual Junta de que no desean renovar su mandato.

Previsiblemente se convocará una Asamblea Extraordinaria durante el próximo Congreso Nacional, ya que es previsible que la asistencia de socios sea superior, pero sobre este particular informaremos en su momento.


[bulteno@esperanto.es](mailto:bulteno@esperanto.es).

Ankoraŭ restas tempo, ĉar la venonta bulteno iomete prokrastiĝos pro iom speciala kaŭzo: en tiu ĉi numero oni inkludos la kunvokon al la venonta Ordinara Ĝenerala Kunveno, kiu pro leĝaj kialoj devas okazi en la unua jartriono, kaj kie estos aprobitaj la kontoj, la buĝeton, la raporto pri aktivaĵoj faritaj kaj farotaj dum 2016. Krome, ni rememorigas ke dum tiu ĉi jaro oni devas renovigi la Estraron, kaj estas grave ke la anoj komencu organizi kandidatecojn, antaŭ la anonco de kelkaj estraranoj, ke ili ne deziras renovigi sian postenon.

Estas probable ke oni kunvokos Eksterordinaran Kunvenon dum la Hispana Kongreso, ĉar estas antaŭvideble ke la ĉeesto de anoj estos pli alta tiam, sed pri ĉio ĉi ni informos siatempe.

 **Boletín**

n° 403 Janaro - Maro 2014



FESTACI  
DE  
ESPERANTO

Imagino de: *estilo publico*

**UN PROGRAMA ESLAVO EN EL  
CONGRESO ESPAÑOL**

**SLAVA PROGRAMO EN LA  
HISPANA KONGRESO DE**

Poco a poco se va concretando el programa del próximo [Congreso Español de Esperanto](#), en Herrera del Duque, a comienzos de julio.

Tendremos literatura y teatro, además de diversión. Pero podemos ya ir confirmando el muy rico programa musical, que va a aprovechar el nombre popular de la comarca "La Siberia", para organizar una especie de festival eslavo, con cantantes esperantistas con raíces en la cultura del este de Europa o norte de Asia. Está confirmada la presencia de Asorti, Mikaelo Bronŝtejn, Ĵomart y Nataŝa, artistas muy conocidos en el mundo esperantista, con estilos muy diferentes, y también de JoMo, un músico occitano que ya ha participado en otros congresos españoles, que posee un amplio repertorio de música basada en la cultura eslava.

A la vez, tendremos ocasión de disfrutar de la cultura musical local, y especialmente podemos citar la participación del grupo de música popular más conocido en la región [Acetre](#), próximo también a nuestro mundo si tenemos en cuenta el carácter bilingüe y fronterizo de gran parte de su repertorio.

Recuerda que el formulario de adhesión es accesible [en nuestra web](#) y también pronto en el boletín de la Federación.

## ESPERANTO

Iom post iom konkretiĝas la programo de la venonta [Hispana Kongreso de Esperanto](#), en Herrera del Duque, komence de julio.

Ni havos literaturon kaj teatron, krom amuziĝon. Sed ni povas jam ekkonfirmi la riĉan kulturen programon, kiu profitos la popolan nomon de la distrikto "La Siberia", por organizi specon de slava festivalo, kun esperantistaj artistoj kun radikoj en la kulturo de la orienta Eŭropo kaj la norda Azio. Ni jam konfirmis la ĉeeston de Asorti, de Mikaelo Bronŝtejn, de Ĵomart kaj Nataŝa, kaj ankaŭ de la "slavumema" JoMo, kiuj espereble ĝuigos ne nur niajn kongresanojn, sed ankaŭ la lokanojn, por krei ponton kulturen inter ambaŭ ekstretoj de la kontinento. Samtempe, kongresanoj povos ĝui specimenojn de la loka kulturo, inter kiuj ni atendas la partoprenon de la plej fama folkmuzika grupo de la regiono, la altkvalita [Acetre](#), proksima al nia idealo pro la dulingva kaj ĉelima karaktero de granda parto de sia repertuaro.

Memoru ke la aliĝformularo troviĝas [en nia retejo](#), kaj ankaŭ en la venonta numero de Boletín.



## RECONOCIMIENTO A AUGUSTO CASQUERO

Augusto Casquero ha sido elegido por el portal educativo en esperanto *edukado.net* como uno de los miembros de su "[Panteón](#)" de profesores ilustres. Es el primer español en esa lista.

Augusto [ha enseñado esperanto](#) no sólo en varias ciudades españolas, sino también ampliamente en lugares como Polonia, China o Vietnam.

La Federación Española de Esperanto, de la que fue presidente entre 2005 y 2008, se une a las felicitaciones por este merecido homenaje.

## AUGUSTO EN LA PANTEONO

Augusto Casquero estis elektita al la "[Panteono](#)", la listo de elstaraj instruistoj, kiujn nomumas la retejo *edukado.net*. Li estas la unua el la listo devenanta el Hispanio.

Augusto [instruis Esperanton](#) ne nur en pluraj urboj de Hispanio, sed ankaŭ amplekse en landoj kiel Pollando, Ĉinio kaj Vjetnamo.

Hispana Esperanto-Federacio, kies prezidanto li estis inter 2005 kaj 2008, varme lin gratulas



## DONACIÓN DE PATRIMONIO NACIONAL

La Federación Española de Esperanto ha recibido una donación de material informático, entregado por Patrimonio Nacional en su campaña de apoyo a organizaciones no gubernamentales.

En la foto los presidentes de la Federación y del Liceo Madrileño de Esperanto, con el responsable de la campaña, en las oficinas del Palacio Real.

## DONACADO DE LA NACIA HEREDAĴO

Hispana Esperanto-Federacio ricevis donacadon de informadika materialo, fare de la Oficejo de la Nacia Heredaĵo (ŝtata institucio zorganta pri monumentoj de Hispanio plejparte rilataj al la monarĥio), en ties kampanjo de apogo al neregistaraj organizaĵoj.

En la foto, la prezidantoj de la Federacio kaj de Madrida Esperanto-Liceo, José Antonio del Barrio kaj Manuel Parra, kun la respondeculo de la kampanjo David Trigo, ankaŭ esperantisto, en la oficejoj de la Reĝa Palaco de Madrido.



## CÓMO HACERSE SOCIO DE LAS ASOCIACIONES MUNDIAL Y ESPAÑOLA

Recordamos que la Federación facilita la adhesión a la [Asociación Universal de Esperanto](#) y el abono a su órgano

## KIEL FARIĜI ANO DE LA INTERNACIA KAJ LA HISPANA ASOCIOJ

Ni rememorigas ke HEF faciligas la aliĝon al [Universala Esperanto-Asocio](#)

oficial, la revista “*Esperanto*”. Los importes y condiciones pueden consultarse en la web <http://uea.org>. Para cualquier trámite, se puede contactar con la dirección [hisperanto.uea@terra.com@terra.com](mailto:hisperanto.uea@terra.com@terra.com), o se puede consultar la página <http://esperanto.es/hef/index.php/servoj/perado>, donde también se incluyen servicios de intermediación a revistas.

Como siempre, recordamos que en nuestra web puedes encontrar también el formulario de inscripción a la Federación Española de Esperanto, para el año 2016. Puedes acceder a la [página correspondiente de nuestra web](#).

[Únete a nosotros](#). Y, mientras tanto, ¡disfruta de unas felices fiestas y de un año nuevo muy próspero!

kaj la abonon al ĝia oficiala revuo “*Esperanto*”. La kondiĉoj kaj kotizoj estas konsulteblaj en la retejo <http://uea.org>. Por pluaj informoj kaj pagoj oni povas kontakti kun nia peranto Pedro Garrote, ĉe la adreso [hisperanto.uea@terra.com](mailto:hisperanto.uea@terra.com). Oni ankaŭ povas uzu tiun saman konton por pagi la aliĝilon al la UK aŭ simple por sendi monon al sia konto ĉe UEA.

Konsultu la paĝon <http://esperanto.es/hef/index.php/servoj/perado>, kie oni povas aliri al servoj de perado de revuoj en la internacia lingvo.

Kiel ĉiam, ni rememorigas ke en en nia retejo alireblas la aliĝilo, por fariĝi membro de Hispana Esperanto-Federacio. [Jen la paĝo](#).

[Venu kun ni!](#) Kaj dume, havu tre feliĉajn festojn kaj prosperan novan jaron!

